

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Fünfter Jahrgang



Nr. 7 Juli 1952

IFEF en la *Ŝvaba Venecio*

La urbo Lindau, kiu hodiaŭ verdire estas Bavara, tamen prave havas tiun pompan italan nomon. Ĉiukaze dum unu semajno, la lasta de Majo, ĝi situas en Esperantujo. La bela kongresurbo en




La postkongres-ekskursaj aŭtobusoj antaŭ la preĝejo de Riezlern (Malgranda Valzer-valo, Aŭstrio)

la Lago Konstanca gastigis por ses tagoj la kongreson de Internacia Federacio Esperantista Fervojistaj (IFEF). Grandaj tekst-rubandoj en kaj antaŭ la stacidomo salutis la kongresanojn kaj atentigis la multajn fremdulojn, kiuj pasigis sian libertempon en ĉi tiu vizitinda pejzaĝo. Ĉe la kajoj de la fervoja stacio kaj de la haveno, antaŭ la stacidomo, apud la teatra kaj koncerta salonegoj, inter la ĉiunaciaj flagoj sur la moleo (havendigo), ĉie flirtis la verdaj standardoj kaj flagoj.

La malgranda insulo, nur kelkcent metrojn longa kaj larĝa, prezentas tial la avantaĝon, ke oni eĉ pene ne povas misiri, ĉie oni atingas post kelkaj minutoj la lagobordon. Tiu fakto kaŭzis, kvankam nur malpli ol 500 samideanoj ĉeestis la kunvenojn, ke inter la kongresaranĝoj preskaŭ ĉiu kvina homo, kiun oni renkontis surstrate, estis IFEF-ano aŭ almenaŭ Esperantisto. Feliĉa kiu ne havis ĉapelon sur la kapo por devi ĝin salute depreni.

Tre menciinde estas, ke la Sociala Organizo de la Germana Federacia Fervojo (ESW) okazigis kaj finance subtenis tiun internacian kunvenon. Tamen la libervolaj helpantoj kaj la Organiza Komitato kun sia estro s-ano Pape, Esperanto-fakestro de la Germana Fervojo, meritas plenan laŭdon pro la bonegaj aranĝoj kaj la modela organizado. La fervojistaj gekolegoj el dekunu Eŭropaj landoj ofte esprimis siajn admiron kaj dankon por tio. Kiam antaŭ la kongrestagoj ni renkontis s-ron Pape, intertraktantan en la trafik-oficejo, ni proponis nian helpon por la preparoj. Sed li dankante rediris: „Ne necesas, nur kelkajn paneojn mi ankoraŭ devas morttredi.“ Kaj li tre lerte tredis.

En la nokto al dimanĉo, la unua kongrestago, ni salutis sur la kajo Nederlandan karavanon de ĉ. 90 gesamideanoj. Pli-malpli grandaj grupoj kaj unuopuloj nun unuj post la aliaj alvenas, i. a. Italoj, Svedoj, Danoj, 60 Francoj, kaj eĉ kolegoj el Finnlando alvenas. En la fervoja kantino oni unuafoje renkontiĝas, dum la komuna tagmanĝo. La senprograma tamen amuza interkoniĝ-vespero tro rapide pasas ĉe muziko, interbabilado, komuna kantado kaj eĉ magiistaj prezentadoj. Inter la oficialaj aranĝoj restas sufiĉe da tempo por rigardi la belan urbeton kun ĝiaj antikvaj domoj kaj turoj, barokaj preĝejoj kaj renesancaj konstruaĵoj aŭ observi la vignecon en la haveno, kiun signas la lumturo, de malproksime videbla, kaj la Bavara Leono. Promenoj en la



Dum la ŝip-ekskurso kaj samtempe okazanta internacia surŝipa balo fiere flirtis la Esperanta flago sur la masto

ĉirkaŭejon, kiu prezentas pentrindajn perspektivojn al la Aŭstraj kaj Svisaj alpmontoj, estas multe ŝatataj kaj ne malmultaj kongresanoj ekskursas por kelkaj horoj trans la limon al la famkonata Bregenz en Aŭstrio.

La Solena Malfermo okazis lundon, la 26-an de majo, en la feste ornamita urba teatro. S-ano Reichsbahnrat Pape salutinte diris fine: „La armeoj de Eŭropo parolas kvin lingvojn, la Eŭropaj fervojistoj parolas unu lingvon.“ La supera urbestro de Lindau Geheimrat Frisch deklaris: „La neceseco de tia lingvo estas evidenta.“ La re-

Jam ĉe la alveno en Lindau

en la stacidomo salutis la gekongresanojn larĝaj tekst-rubandoj kun verdaj steloj



WK/102/1/72



Jen Uljeo studanta sian bildlibron:

Uljeo Brandenburg kiu „heredas“ nian lingvon! Fotografis lin lia patro aldone al la artikolo „Hereda lingvo“ en n-ro 6/1952

prezentanto de la Aŭstra Fervojo (BBO), Bundesbahnrat ing. Frischau f, menciis, ke BBO akcelas ĉiamaniere la fervojistan Esperanto-movadon. S-ro D al i d e t, Inspecteur Principal de la Francaj Fervojoj SNCF, partoprenis kiel neesperantisto la tutan kongreson. Sian Esperantlingvan salutparoladon li finis jene: „Ĉi tiuj kongresoj estas festoj de l' spirito kaj de la kora interkompreniĝo en atmosfero frateca.“ Laŭ la reprezentanto de la Norvega Stata Fervojo, Carlsen, ankaŭ tie la fervoja administracio komencas interesiĝi. La reprezentanto de la Germana Fervojo (DBB), Reichsbahnoberrat d-ro Rixius, aŭdigis Germanlingve la salutojn de la ĉefadministracio kaj daŭrigis: „La kunigo de Esperantostelo kaj flugilrado ŝajnas al ni feliĉeca simbolo kaj esperplena promeso. Samkiel la reloĵ ne ĉesas antaŭ la limo, ankaŭ la lingvon ne haltigu iu baro.“ Krome salutis la reprezentantoj de UEA, de diverslandaj Esperanto-asocioj kaj de diversnaciaj fervojistaj sindikatoj. Nome de SAT kaj GEA d-ro Ziegler havis kuraĝigajn salutvortojn. Por la Unuiĝo de la Fervojaj Faklernejoj Germanaj salutis s-ano W a g n e r menciante, ke ĉi tiu institucio laŭeble per kursoj helpas la disvastigon de Esperanto precipe inter la fervojistaro. Post la parolado de ĉiuj deligitaj IFEF-prezidanto S t a p e l per insistaj vortoj malfermis la kongreson. La orkestro de la Fervoja Riparejo Friedrichshafen kadrumis per siaj prezentadoj la impresan solenon.

Mardon oni vizitis la Fervojan Riparejon en Friedrichshafen, kie la kongresanoj havis okazon studi la Germanajn labormetodojn ĉefe pri riparado de motorvagonoj. Spertaj gvidantoj, klarigantaj ĉion necesan, akompanis la grupojn tra la laborejoj. Germanaj kolegoj lerte interpretis, tiel ke ĉiu intereso senpene povis sekvi la teknikajn funkciojn aŭ labormanierojn de la maŝinoj, motoroj, kromum-instalaĵoj kaj kion ajn ni vidis. La postaj fakprelegoj temis pri la plej diversaj aferoj. Franca kolego Turbellier detale pritraktis plurajn tipojn de Francaj motorvagonoj. Eksterordinare interese parolis Reichsbahndirektor s-ano S c h u c h m a n n, reprezentanto de la Germana Fervojo (DBB) en Parizo ĉe la Francaj Fervojoj (SNCF), pri la projekto kanaligi la Mozelon kaj

klarigis la kontraŭproponon de SNCF kaj DBB. La Itala delegito rakontis pri la multflankaj rilatoj de transporto kaj komerco al la fervojoj. S-ro S i m o n (Germanio) montris modernajn metodojn por riparo de vapor-lokomotivoj.

En la laborkunsido oni ĉefe pridiskutis internajn aferojn kaj organizajn demandojn. „Aliĝo al UEA aŭ SAT por nia federacio ne estas rekomendinda“, diris la Norvega delegito, „ĉar en diversaj landoj la naciaj IFEF-organizaj ricevas subvenciojn de la fervojoj aŭ sindikatoj. Ĉiu laŭvole aliĝu unuope.“ S-ano Pape raportis pri la gravega laboro de la terminara komitato. Kvankam ĝis nun aperis multaj fakartikoloj en fervojistaj bultenoj aŭ aliaj gazetoj kaj ekz. Radio Vieno jam pli ol 40-foje disaŭdigis fakprelegojn, restas la ne facila laboro kolekti kaj elprovi la taŭgajn fakterminojn sur internacia bazo. La Aŭstra delegito Zink proponis, elpendigi en ĉiunaciaj stacidomoj informafiŝojn pri Esperanto-Servo, kiel ili jam ekzistas en Aŭstrio. La Nederlandanoj invitis al la venontjara IFEF-kongreso en Utrecht. Por 1954 oni provizore fiksas Italion. La malnova estraro estis instigata daŭrigi sian energian laboron por unu plia jaro. Fine oni aprobis laŭ propono de s-ano Pape jenan rezolucion:

1. La fervojoj ĉiulandaj akceptu la naciajn IFEF-grupojn kiel fakgrupojn en siaj kulturaj organizoj (kiel okazis en Italio, Aŭstrio, Francio, Germanio).
2. Ĉi tiuj grupoj havu samajn favorojn kiel alispecaj organizoj (ekz. sport-, kantad-, ŝak- k. a. grupoj) rilate libertempon ktp.
3. La fervojistoj Esperanton parolantaj havu samajn favorojn en la deĵoro kiel la aliaj fremdlingvuloj (tio jam ekzistas por Aŭstroj).

La lastan tagon finfine ankaŭ la ĉarmulinaj pretendis siajn rajtojn. Internacia balo dum ŝipekskurso sur la

Ŝvaba Maro, tio estis la plej bela elpensajo de la kongreskomitato. La granda, lukse ekipita ŝipo surhavis festan veston. Flagetoj de ĉiuj nacioj ornamis ĝin kaj la mezan maston kronis la verda flago de Esperantujo. La kara suno laŭpove favoris nian entreprenon. Dancante kaj admirante la ravan panoramon daŭre aliĝigante ni atingis la unuan stacion Mainau. Post minutoj tiu insuleto estis apartenajo de la 11-nacia kolegaro, kiuj inter si konkuris pri bonhumoro. Kiu la Nederlandanojn kredis malviglaj, tiu jam sur la ŝipo estis pli bone informata, sed vespere en Mersburg sendube la kantemaj Italoj havis la plej grandan parolon. Certe la vinaj spiritoj jam iom efikis. La komuna reiro de la supera urbo al la lagokajo fariĝis gaja propaganda marŝo. Dubele, kiu estis la plej memorinda travivaĵo de ĉi tiu tago. Belega surprizo nin ankoraŭ atendis fine de nia vespera reventuro: la iluminacio de la Lindau'a haveno kiel bildo el la fabellibro. „Sub la sankta signo de l' espero“ sonas la vortoj de la himno trans la nokte malhuman lagon, dum la ŝipo malrapide ŝoviĝas preter la lumturo. „Adiaŭ al la amikoj, kiuj morgaŭ ekskursos Svision!“

La partoprenantoj de la dua postkongresa ekskurso, kiu kondukis al Oberstdorf, vendredon jam frue ellitiĝis. Sed ankaŭ tiu neforgesebla tago multoble rekompencis la penon. La majesto de la neĝokovritaj montoj tre impresis la platlandanojn. La sovaĝa beleco de Breitachklamm (Brajtaĥklam) kaj la ĉarmo de la Malgranda Valzer-Valo kun la bela loko Riezlern (Riclern) ravis ĉiun vizitanton. La tro mallonga tempo eĉ ne al ĉiuj permesis la ŝnurvagonan veturon al Nebelhorn. „Belega“, tio estas la vorto, kiun oni plej ofte aŭdis ĉi tiun tagon; kaj vere inde finiĝis tiu belega, impona kongreso, kiu plifirmigis la kontaktiĝon inter la Eŭropaj fervojistaj kolegoj. „Ĝis revido en Nederlando!“

Willi Brandenburg

Antaŭ la nunjara ĉefkunveno de GEA

Ni Esperantistoj estas popoloeto kun multe da sento kaj kompreno por demokratismo, por individuismo. Nia tuta movado de ĉiam staris sur ĉi tiu bazo. Brila ekzemplo por vere demokrata kaj altruisma konduto ankaŭ ĉi-rilate estas nia Majstro. Do, konkludo estas simpla: ni imitu, kiel ĉiam, nian lingvo-patron D-ron Zamenhof.

Kion signifas tio? Nu, ke ni estu justaj, toleremaj, modestaj, pacemaj. Kvankam ni Esperantistoj ja ankaŭ estas homoj — nur homoj! ne anĝeloj —, ni tamen ne volas akcenti la pli malbelan flankon de nia homa naturo. „Nebona estas hom!“; tiel oni kantis en la vastkonata „Tri-groŝ-opero“. Sed ni Esperantistoj ne volas subiĝi al ĉi tiu pesimisma eldiro. Ni volas montri nian nevenkeblan bonvolon ĉiam kaj ĉie, do ankaŭ en Duseldorf dum nia nunjara ĉefkunveno.

Ĉi tiu sola okazo dum unu longa jardaŭro kunveni, konatiĝi kontaktiĝi pli bone, pli intime ol kutime, estu por ni bonvena tempo por flegi harmonion kaj gefratajn sentojn inter ni. Certe, oni devas kelkfoje preparoli aferojn, pri kiuj regas malkonsento kaj diversaj opinioj; sed estas tamen nia devo serĉi la komunajn punktojn kaj sur tiu jam forta bazo solvi la diskutindajn problemojn.

Demokrato rajtas kritiki; sed lia kritiko estu malmalica, konstrua, pozitiva. Ofte li ne scias proponi ion pli bonan. Sed jam la malkovro de io netaŭga, kritikinda povas enhavi ĝermon por plibonigo. Kiu multe laboras por nia afero, eble ankaŭ eraras, sendube multe pli ol tiu, kiu nenion faras. Do la nenionfaranto estu nia modelo? Neniel! Guste li preferu modeste silenti. Car li similas al tiu, kiu fosis sian talenton en la teron kaj poste ricevis de la Majstro la riproĉon, ke li ne aplikis siajn kapablojn en maniero kaj amplekso por li eblaj. Sed ni ĉiuj ja volas esti bonaj kaj prudentaj servistoj de nia komuna idealo.

Jfb.

So, bonan vesperon! Kia surpriza vizito! Bonvolu eniri!"

"Bonan vesperon! Jam de longe ni ne vidis unu la alian, tial mi volis uzi preteriron, por rigardi, kiel vi fartas. Lastatempe vi ne vizitis la grupvesperojn kaj mi jam havis zorgon pro via sanstato. Sed ŝajne vi fartas sufiĉe bone."

"Nu, mi estas kontenta. Post kelkaj semajnoj mi esperas rehavi mian pli fruan bonan sanon. Sed mi dankas por via amika intereso. Kaj kiel fartas vi?"

"Mi dankas. Mi ne havas kaŭzon por plendi. Mi nur havas iom tro da laboro kaj taskoj. Mi nur volis snufi iom freŝan aeron."

"Arangŭ vin komforte kaj ni babilu iomete!"

"Dankon. Mi akceptas, sed ne por longe. Hejme atendas la laboro."

"Vi povas rakonti al mi novaĵojn el nia movado. Kvankam mi legas kaj abonas kelkajn Esperantorevuojn, mi ŝatas aŭdi novaĵojn."

"Multon mi ne povas rakonti. La grupvesperoj estas ĉiam bonaj. La parolkapableco de niaj membroj kreskas de vespero al vespero."

"Tio ĝojigas min."

"Tamen mi ne estas kontenta. Tute ne kontenta mi estas."

"Pro kio vi ne estas kontenta? Cetere, ĉu vi fumas cigaron aŭ cigaredon? Jen elektu!"

"Dankon! Mi referas cigaredon, se mi rajtas elekti."

"Nu, diru, pri kio vi estas malkontenta?"

"Laŭ mia opinio nia bela kaj valora Esperanto-movado stagnas."

"Nu, nu! Cio ja estas en bona fluo. Aperas novaĵ libroj, okazas malgrandaj kaj grandaj kongresoj, gravaj personoj subtenas nin... kaj tiel plu..."

"Jes, tio estas ĝusta. Sed diru, ĉu ni havas sukcesojn, laŭ kiuj ni povus konjekti, ke ni dum ĝisviveblaj jaroj povos diri: Ni venkis! Ĉu la mondo parolas Esperanton, se kunvenas homoj el diversaj nacioj?"

"Nee — tamen jam ekzistas multaj esperantistoj. Pripensu, en Munkeno lastjare ĉeestis du mil homoj."

"Jes — ĉeestis du mil homoj. Sed ĉu vi iel rimarkis, ke la Esperanto-movado en Germanujo ricevis per tio gravan antaŭenpuŝon?"

"Sincere dirite, ne. Tamen mi volonte rememoras pri la Munkenaj tagoj."

"Ankaŭ mi. Sed progreson oni sentas nenie."

"Tiel rapide ne maturiĝas bonaj kaj valoraj fruktoj."

"Pardonu, ke konstante mi kontraŭargumentas. Sed nia frukto — por resti ĉe via komparo — jam kreskas dum pli ol sesdek jaroj. Iomete oni ja devus vidi almenaŭ ekmaturiĝon..."

"Ĉu oni ne apelaciis al UNO?"

"Jes, oni kolektis la subskribojn, transdonis ilin en Lake Success — sed la rezulto?"

"Vi rajtas. UNO ĉiam ankoraŭ intertraktas nacilingve — tre multekosta aparato, cetere."

"Guste pro tio mi ĉiam denove ĉagreniĝas. Mi preskaŭ tage kaj nokte pensas pri rimedoj, kiel oni povus akiri la atenton de la mondo. De la oficiala kaj potenca mondo, sed..."

"...vi ne trovas eliron, ĉu ne?"

"Jes kaj ne!"

"Ĉu vi volas paroli pri via meditado?"

"Volonte! Sed mi kredas, ke hodiaŭ mi ne povas fini. Estas tro ampleksa temo."

"Nu, ni ja povos daŭrigi alian vesperon. Se mi estos tute sana, mi povos veni al vi — pro alterno."

"Bone, mi konsentas. Mi jam diris: estas ampleksa afero. Ofte oni legas pri akcepto aŭ favora juĝo pri nia Esperanto. Oni legas ĝin — ĝojas kaj

brojn, ke ni povas influi la mondon nur malmulte per tia minimumo de nombroj."

"Jes, mi devas konfesi tion, sed estas ja ankoraŭ la aliaj ligoj: SAT, Universala Ligo kaj la naciaj organizaĵoj. Ili prezentas ankaŭ certan nombbron."

"Nun — jes. Ni foje taksu la tutan nombbron de organizitaj esperantistoj. Ni diru grandskale: centmil."

"Eble estas iom pli."

"Tamen, centmil kaj kelkaj pli estas polvo en komparo kun du miliardoj. Jes, la centmil estus granda forto, se oni trovus vojon kunigi ilin kaj se oni povus uzi la monon elspezitan kaj la tempon oferitan de la centmil homoj. Baldaŭ fariĝus el cent ducentmil, kvincentmil, eĉ miliono — kaj jen oni jam estus granda forto, kiun devus atenti la alia parto de la homaro."

"Via ideo estas logika, sed pripensu la egan diversecon de la du miliardoj da homoj laŭ nacioj, mensoj kaj laŭ — mondperceptoj!"

"Kompreneble tio estas stato ne superebla por malmultaj homoj. Sed oni almenaŭ komencu aliigi la nunan staton de fatalismo kaj hazardo."

"Kiel mi komprenu tion?"

"Nu, mi imagas kolekton en unu centro de la mono elspezita por Esperanto de la nuntempaj cent mil esperantistoj — kaj oni uzu ĝin unue por propagando de Esperanto."

"Tion oni ja faras en Londono ĉe UEA. Ili eldonas revuon kaj jarlibron, prizorgas la reton de la delegitoj, arangas la Universalajn Kongresojn — subtenas la financigon de gravaj libroj kaj multon alian."

"Bone! Bone! Tion mi scias kaj volas ne maldanke aŭ malŝate paroli pri tio. Sed sincere dirite — ĉio forvaporiga, sen ke oni sentas antaŭenigon de nia mond-movado."

"Ne tiel severe juĝu la aferon. Pripensu la situacion de la nuna movado. Kaj bonvolu ne forgesi, ke la Esperanto-movado postvivis du mond militojn kaj ties sekvojn."

"Kompreneble, tio grave influis la tutan evoluon. Kaj ĝuste tial mi vidis en la fakto, ke nia Esperanto dufoje leviĝis kiel fenikso el la cindro, la konstato ke ĝia nepra boneco valoras la streĉon de ĉiuj fortoj por antaŭenigi ĝin, por grandigi ĝin tiel, ke ĝi helpu plibonigi la mondon kaj realigi pli feliĉajn viveblecojn. Se mi mem dekomence de mia esperantistiĝo ne estus havinta ĉi tiun konvinkon, mi jam delonge estus fininta mian laboron por Esperanto."

"Jen — mi ree ekkonas vin, kiel malnovan pioniron. Tial ni helpu plu en la laboro por Esperanto!"

"Tamen per idealismo sole ni ne venkos en nia vere reala mondo. Mi pripensas ĉiam, se mia profesio permesas tion, kiel doni inspiron al la movado. Ni devus provi kunigi almenaŭ la Esperanto-movadon de la Okcidenta Mondo."

"Nu, ni ja havas komencon de tia kunigo en Germanujo. En la Centro

ĈU NIA MOVADO STAGNAS?

Dialogo de Maks Federl

Ni komencas hodiaŭ dialogon pri problemoj esperantistaj kaj petas niajn legantojn tuj skribi al ni, se nia kunlaboranto Max Federl iel eraris. Ni volonte estas pretaj publikigi ankaŭ la opinion de niaj estimataj gelegantoj. Estiĝu fruktodona pritrakto kun espereble bona rikolto!

oni aŭdas bedaŭrinde nenion pli."

"Mi devas konsenti. En la Ponto mi ofte kaj ofte legis pri favoraj juĝoj de urbestroj, urbkonsilistoj kaj eĉ de ministroj. Ne nur en Germanujo, sed ankaŭ en eksterlando."

"Mi multe pensis pri tiuj faktoj. Aŭ la favorantoj esprimas sian bonŝancan opinion nur por elegante forigi la aferon — aŭ de nia flanko oni ne zorgas pri konsekvenca efektivigo de la promesoj."

"Oni povas supozi tiun aŭ tiun aŭ ambaŭ konkludojn ĝustaj. Sed povas esti aliaj, pli gravaj kaŭzoj, ke ni nur malrapide progresas."

"Certe! Laŭ mi mankas centro, kiu konscie kondukas kaj gvidas nian movadon. Mi ripetas: konscie!"

"Nu, ni ja havas nian Universalan Esperanto-Asocion, la naciajn organizaĵojn kaj aliajn fakajn ligojn kaj tiel plu."

"Jes, vi pravus! Sed ĝuste tion mi rigardas manko. La organizado estas bona — sed mankas la cerbo, kiu konscie direktas ĉion."

"Kaj UEA — kion ili faras? Mi taksas ĝin ĉiurilate tre valora kaj aktiva."

"Ne, mi ne! Sed poste mi diros, kial mi ne estas kontenta. Nun ni rigardu nudajn nombrojn. UEA estas tutmonda organizo; sed kiom da membroj ĝi havas?"

"Nu, tion mi povas diri al vi. En la lasta numero de 'Esperanto' mi legis la statistikon pri tio. Jen: Fine de aprilo 8196 membroj."

"Kaj nun komparu vian nombron kun la vivanta homaro! Du miliardoj kontraŭ 8196! Certe nun ankaŭ vi konfesas komparante ambaŭ nom-

Aktuala Terminareto

angewandter Chemiker praktika, teknika kemiisto
anspringen (Motor) ekfunkcii
aufreizend (seks)ekscita
Bodenschätze tertrezoroj
Camp tend okampo; -aro
Doktorand kandidato pri doktoreco
drall pufa. **Der Drall** rotacio; -forto
etwas durchdrücken, ~setzen akceptigi ion
Fahrt ins Blaue laŭhazarda, senĉela ekskurso. ~ ~ **Grüne** ekskurso en la naturon
Fernzug distancvagonaro
Förderband transportbendo (senfina). ~leistung elterigita kvanto (da karbo, minajo)
Gangster bandano
kalt machen, jm.: mortigi. ~ stellen jm.: seninflui; etw.: meti en la malvarmon
Kater, Katzenjammer postmizero, postdrinka kapdoloro
Klumpfe gitaro
kleiner Grenzverkehr malgranda translima trafiko
Klopfen (im Motor) memfuzo. ~fest fuznormaliga
Kluft, Schale tualetto, vestoj
Kniebeuge (Turnen) genu-disflekso (genuflekso = Niederknien)
Knippskarte seria bileto
„knutschen“ interkaresi sin, kolombumi
Kombination (Hemd hose) kalsonĉemizo
Kraftstoff brulajo, fluŝsiger ~ ~ auch: mineraloleo. ~verkehr motortrafiko
sich krank lachen krevi pro rido
Kriegshinterbliebene familianoj, postrestintoj de militfalinto
Krüllschnitt mezsubtila tabako

Cu nia movado stagnas?

Munkeno kunagas GEA, SAT kaj multaj fakaj asocioj.

„Vi pravas. Sed diru al mi, kion rezultigis tiu kunagado?“

„Sincere dirite nenion aŭ almenaŭ malmulte. Ekzemple en aŭgusto okazos en sinsekvo la kongresoj de SAT kaj GEA. Tio certe havas organizajn kaj financajn avantaĝojn —“

„Certe, tio estas io — sed ĉu tio gvidos la Esperanto-movadon al rimarkindaj progresoj? Cu vi ion esperas?“

„Mi ne kapablas prijuĝi tion tuj. Ni devas esperi kaj fidi pri niaj estraranoj.“

„Jen, kion mi ĉiam diras: esperi kaj fidi — sed en realeco okazas nenio.“

„Bone, sed kiel vi volas solvi ĉi tiun malfacilegan problemon?“

„Mi ja diris komence, ke estas ampleksa demando kaj mi kredas, por hodiaŭ fini nian interparolon. Vi jam laciĝas. Eble pripensu ankaŭ vi la problemon. Mi baldaŭ revizitos vin kaj ni daŭrigu. Pardonu, ke tiel longe mi postulis vian atenton!“

„Nu, mi ankoraŭ povis sekvi vian diraĵon, sed estas fakte jam malfrue kaj vin ja atendas laboroj. Do mi dankas por via vizito.“

„Fartu bone kaj ĝis baldaŭa revido.“

„Bonan nokton!“ (Daŭrigota)

Liegenschaftsamt katastr(ofice)jo
meistbietend versteigern: aŭkcii al plej alta oferto

Meister (Sport) ĉampiono. ~**klasse** -a klaso. ~**schaftskandidat** kandidato pri -eco

mildernde Umstände indulgigaj cirkonstancoj

motorisiert (z. B. Truppe) motor(hav)a

Muskelkater muskola postdoloro

Niete techn.: vinkto; Los: sengajna loto; Mensch: stultulo, neuzebla homo, neniopovanto

Notstandsgebiet regiono de helpobezono

Photomontage foto kunmetaĵo, -kombinajo

scharf (Photo) klarkontura

Schnauzer terhundo

Silberpapier staniolo

Strandanzug strandkostumo

Terrier teriero. **Fox** ~ vulpo

Übertragungswagen (Rundfunk) transenda auto

Wehrbeitrag kontribuo al defendo, al armearo

Wochenkarte semajnbileto

Zensur (Schule) juĝnoto Hans Wingen

Ein Streifblick auf -ieren und -ion

Die deutschen Fremdwörter auf -ieren und -ion verlieren diese Nachsilben im Esperanto: korrespondieren = korespondi, Nation = nacio; in dieser Weise gibt es Hunderte von Beispielen. Häufig läßt sich im Deutschen von einem Stamm sowohl ein Zeitwort auf -ieren wie ein Hauptwort auf -ion ableiten; informieren, Information; intervenieren, Intervention usw. Dann sind im einzelnen zwei Fälle möglich:

1. Der Stamm im Esperanto ist zeitwörtlich: informi, esplodi. Zugehörige Hauptwörter: informo (Information), esplodo (Explosion).

2. Im Esperanto ist das Grundwort ein Hauptwort: funkcio, operacio, adicio. Zugehörige Zeitwörter: funkcii (funktionieren, fungieren); operacii (operieren), adicii (addieren). In diesem Fall ist also von dem deutschen -ion das i übriggeblieben, und das t vor dem i wird im Esperanto zu c (so wird es ja im Deutschen auch gesprochen).

Im Deutschen haben das Hauptwort (auf -ion) und das zugehörige Zeitwort (auf -ieren) oft nicht genau denselben Stamm; das rührt aus dem Lateinischen her: explodieren, -sion; diskutieren, -ssion; fungieren, -nktion; fingieren, Fiktion; subtrahieren, -ktion; sezernieren, Sekretion usw. Im Esperanto ist dagegen fast immer nur ein Stamm vorhanden, was ja völlig langt.

Auch wenn im Esperanto das Grundwort ein Verb ist, braucht es doch nicht vom deutschen Verb abgeleitet zu sein: infekti kommt nicht von infizieren, sondern von Infektion, also vom deutschen Hauptwort. Ebenso z. B. injekti, redakti usw. Trotzdem gehören diese Fälle aber zu 1), weil der Esperanto-Stamm zeitwörtlich ist, nicht auf i endet (also das ganze -ion wurde weggelassen) und auch das deutsche t

(Infektion) nicht in ein c umgewandelt ist.

3. Es gibt aber auch noch einen dritten Fall: das Grundwort im Esperanto ist weder verbal noch substantivisch, sondern eigenschaftswörtlich. Dann wird -ieren durch -igi wiedergegeben, -ion durch -eco: preciza, precizigi, precizeco; diskreta, -eco; aktiva, -igi. Hierher gehört häufig deutsches -isieren: generalisieren generaligi, realisieren realigi, konkretisieren konkretigi.

Die oben gegebenen „Regeln“ sind nicht ausnahmslos; es sind übrigens ja auch keine Regeln der Sprachlehre, sondern des Wörterbuchs. Die Ausnahmen können auch nicht wundernehmen, wenn man bedenkt, daß die deutschen -ieren- und -ion-Wörter aus dem Lateinischen stammen und oft durch gottweißwas für Zwischensprachen gewandert sind, bis sie im Deutschen anlangten; und jede Sprache hat an ihnen modeln können.

Manche Unregelmäßigkeiten erklären sich auch dadurch, daß wir oben die ion- und -ieren-Wörter nur vom Deutschen ausgehend betrachteten; wenn wir von anderen Sprachen ausgehen, ist gar nichts Ausnahmeartiges mehr an ihnen. So läßt sich infekti sofort aus dem Englischen und Französischen erklären: to infect, infecter; redakti: to redact. Die Wortformen im Esperanto bilden etwa eine Art Mittelwert der verschiedenen Sprachen.

Von manchen „Paaren“ (-ion und -ieren beim selben Stamm) findet sich im Deutschen nur eins der beiden Wörter: (z. B. Vivisektion, aber nicht vivisezieren), oder nur eins ist gebräuchlich (z. B. Korruption, aber nur selten korrumpieren), oder eins ist nur im wissenschaftlichen Sprachgebrauch vorhanden (Sekretion, aber sezernieren nur in Biologie und Medizin üblich). Manche ion- und -ieren-Wörter sind auch völlig veraltet (ästimieren). In anderen Sprachen ist das alles wieder anders verteilt.

Die deutschen Zeitwörter haben meist kein -ion in sich (fungieren), aber zuweilen doch (funktionieren, fraktionieren).

Manche ion-Wörter haben auch im Esperanto die Endung -iono; meist um sie von io-Wörtern zu unterscheiden: komisiono, komisio; stadiono, stadio; leciono, lekcio; aber auch ein paar andere: miliono, bastiono.

Das alles und noch manches andere könnte man bei den vielen ion- und -ieren-Wörtern untersuchen — ein ganz hübsches sprachwissenschaftliches Arbeitsgebiet.

Hans Wingen.

NOGEO-renkontiĝo

okazis ĉi-jare en Rendsburg, je la ĉielirtago (22. 5. 52). Partoprenis ĉirkaŭ 150 personoj el la tuta norda regiono, kaj ankaŭ 30 gastoj el Kolding, Danujo.

Speciale menciinda en la jarkunveno estas parolado de s-ano Moravec, München, pri infanedukado, kaj dua pri la urbo Rendsburg de s-ro von Essen, kiu cetere multe klopodis por sukcesigi la tagon.

Radio Rendsburg akceptis raporton de s-ro Bünemann, Hamburg, kaj la danoj. Ĉi tiuj invitis nin por aŭtuno al Kolding, kion ĉiuj ĝoje aplaudis.

Por la venonta jaro oni fiksis kiel renkontejon de NOGEO la urbon Flensburg. Elfriede Günther

Josef von Eichendorff

El la vivo de Netarigulo

ROMANTIKA NOVELO · TRADUKO EL LA GERMANA LINGVO DE PAUL BENNEMANN

(Dekunua daŭrigo)

„Vidu“, li diris, „kiel vi jam ŝvelas pro la iometa laŭdo. Pentu kaj kritike rigardu tiun ĉi danĝeran metion! Ni geniuloj — ĉar ankaŭ mi estas tia — ŝatas la mondon same malmulte, kiel ĝi ŝatas nin; sed en niaj „sep-mejloj-botoj“, kiujn ĉe naskiĝo ni preskaŭ jam kunalportis, ni marŝas sen iuj konsideroj rekte al la eterneco. Ho plej mizera, malkomforta, disstariga pozicio: unu piedo en la estonteco, kie ekzistas nenio escepte matenruĝo kaj intere la vizaĝoj de estontaj infanoj; la alia ankoraŭ meze de Roma sur la Piazza del Popolo, kie la tuta jarcento, uzante la bonan okazon, volas kunformarŝi kaj alkruciĝas al la boto, kvazaŭ ili volus elŝiri nian gambon! Kaj ĉiu ĉi baraktado, vintrinkado kaj malsatado nepre nur por la neniam mortanta eterneco! Kaj vidu tie sur la benko sinjoron mian kolegon, kiu ankaŭ estas geniulo. Jam la ĉi-tiea tempo ŝajnas al li tro longa; kion do li faros poste en la eterneco?! Jes, atestimata sinjoro kolego, vi kaj mi kaj la suno, ni kune leviĝis hodiaŭ matene kaj estis cerbumantaj kaj pentrantaj dum la tuta tago, kaj ĉio estis bela — kaj nun la dormema nokto glitigas sian peltmanikon surtrans la mondon kaj estas forviŝinta ĉiujn kolorojn.“

Li senĉese parolis plu, kaj kun siaj haroj konfuzitaj sekve de la dancado kaj trinkado li aspektis en la lumbrilo tute kadavropala.

Sed mi jam delonge sentis teruron pro li kaj lia sovaĝa dirado: kaj kiam nun turniĝante li direktis sin al la dormanta pentristo, mi uzis la bonŝancon, kaŝglitis nerimarkate de li ĉirkaŭ la tablon kaj el la ĝardeno kaj subeniris, sola kaj en mia koro gaja, laŭlonge de la vitospaliro en la vastan valon briligatan de la lunlumo.

De el la urbo la horloĝoj batis la dekan horon. Malantaŭe mi aŭdis alsoni al mi tra la silenta nokto ankoraŭ kelkajn gitarosonojn kaj kelkfoje la vortojn de la du pentristoj, nun ankaŭ hejmenirantaj. Tial mi kuris rapide, kiom mi povis, por ke ili ne plu esplordemandu min.

Ce la pordego mi tuj turnis min dekstren en la straton kaj kun batanta koro rapide iris plu inter la silentaj domoj kaj ĝardenoj. Sed ho, kiom mi mirigis, tiam subite alvenante sur la placon kun la fontano, kiun hodiaŭ dumtage mi nepre ne povis trovi. Tie staris la soleca ĝardendomo ree en la plej belega lumbrilo, kaj ankaŭ la bela sinjorino kantis en la ĝardeno ree la saman italan kanton kiel hieraŭ vespere.

Ravite mi kuris unue al la malgranda pordo, poste al la dompordo kaj fine puŝis per tuta forto al la granda ĝardenpordego; sed ĉio estis ŝlosita. Nur nun mi ekmemoris, ke la dekunua ankoraŭ ne batis. Mi ĉagreniĝis pro la malrapida tempo; sed grimpi trans la ĝardenpordegon kiel hieraŭ — tion mi ne volis pro bonmaniera konduto. Tial mi promenis dum tempeto tien kaj reen sur la soleca placo kaj

fine sidigis ree sur la ŝtonan puton, plena de pensoj kaj sekreta espero.

La steloj brilegis sur la ĉielo; ĉie sur la placo estis senhome kaj silente; plezurplene mi aŭskultis la kantadon de la bela sinjorino, inter la bruado de l' fontano sonantan el la ĝardeno al mi. Tiam subite mi ekvidis blankan personon, kiu venis de la alia flanko de l' ĝardeno kaj iris ĝuste al la malgranda ĝardenpordo. Tra la luna trembrilo mi tre precize rigardis tien — estis la freneza pentristo en sia blanka mantelo. Li rapide eliris ŝlosilon, malŝlosis per ĝi, kaj antaŭ ol mi atendis tion, li estis interne en la ĝardeno.

Nu, jam dekonence mi havis specialan antipation kontraŭ tiu pentristo pro liaj sensaĝaj paroloj. Sed nun mi fariĝis senmezure ekscitita pro kolero. Certe la geniaĉulo estas ree ebria, mi pensis; de la ĉambristino li ricevis la ŝlosilon kaj nun volas kaŝiri al la sinjorina moŝto, perfidi, ataki ŝin. Kaj tial mi enkuregis en la ĝardenon tra la malgranda porteto restinta malfermita.

Kiam mi eniris, estis tute silente kaj solece en ĝi. La duparta pordo de l' ĝardendomo staris malfermita, laktoblanka lumbrilo penetris el ĝi kaj dancis sur la herbo kaj la floroj antaŭ la pordo. De malproksime mi enrigardis. Tie en belega verda ĉambro, kin estis malmulte lumigita de blanka lampo, la bela sinjorina moŝto, kun gitaro en la brako, kuŝis sur silka sofeto, en sia senzorgeco neniel pensante pri la eksteraj danĝeroj.

Sed mi ne havis longan tempon, por rigardi; ĉar mi ĵus rimarkis, ke malantaŭ la arbetoj la blanka persono tute singarde glitpaŝis de l' alia flanko al la ĝardendomo. Dume la sinjorina moŝto kantis tiel melankolie el la domo, ke ĝi tuŝis miajn ostojn kaj

Muziko

Das unaussprechlich Innige aller Musik, vermöge dessen sie als ein so ganz vertrautes und doch ewig fernes Paradies an uns vorüberzieht, so ganz verständlich und doch so unerklärlich ist, beruht darauf, daß sie alle Regungen unseres innersten Wesens wiedergibt, aber ganz ohne die Wirklichkeit und fern von ihrer Qual.

Arthur Schopenhauer.

La neeldirebla subtile-dolĉa de ĉia muziko, per kio ĝi preterpasas nin kiel iu tute bonkonata kaj tamen ĉiam malproksima paradizo kaj, kvankam al ni plene komprenebla, tamen ĉiel neklarigebla — tio subtile-dolĉa havas bazon sur tio, ke ĝi respegulas ĉiujn vibradojn de nia plej interno, sed tute sen la realeco kaj malproksime de ĝia turmento.

A. Schopenhauer.

medolon. Pro tio mi ne longe hezitis, derompis kompaktan branĉegon, kuris kun ĝi rekte kontraŭ la blankmantelulo kaj kriis el plena gorĝo: „Mordio!“ tiel ke la tuta ĝardeno tremis.

La pentristo, vidante min venanta tiel neatendite, forkuris rapide kaj kriis terurege. Mi kriis ankoraŭ pli forte, li kuris al la domo, mi post li, — kaj preskaŭ mi jam estis kaptinta lin, tiam mi involvigis en la malbenindaj florbedoj kaj subite falegis laŭ mia tuta longo antaŭ la dompordo.

„Do estas vi, frenezulo“, mi aŭdis tiam elkrii super mi. „Vi efektive timigis min preskaŭ mortige.“

Mi rapidekstaris, kaj kiam mi estis forviŝinta el miaj okuloj la sablon kaj la teron, staris antaŭ mi la ĉambristino, kiu ĝuste ĉe la lasta salto estis perdinta la blankan mantelon de sur la ŝultro.

„Sed“, mi diris tute konsternite. „ĉu do la pentristo ne estis ĉi tie?“

„Jes, certe“, ŝi respondis maliceme, „almenaŭ lia mantelo, kiun antaŭe, kiam mi renkontis lin sub la pordego, li pendigis ĉirkaŭ mi, ĉar mi frostis.“

Dum la babilado la sinjorina moŝto nun ankaŭ estis saltekstarinta de sia sofo kaj venis al ni al la pordo. Mia koro batis, kvazaŭ ĝi volus krevi. Sed ho, kiom mi ektimis, kiam precize rigardante mi subite ekvidis anstataŭ la bela sinjorina moŝto tute fremdan personon!

Estis sinjorino iom granda, korpulenta, impona, kun fiera aglobeka nazo kaj alten volbitaj nigraj brovoj, vere terurige bela. Per siaj grandaj brilegantaj okuloj ŝi rigardis min tiel majeste, ke mi ne sciis, kion fari pro respekto. Mi estis tute konfuzita. Mi senĉese faris riverencojn kaj fine volis kisi ŝian manon. Sed ŝi rapide fortiris la manon kaj poste parolis en itala lingvo al la ĉambristino, el kio mi komprenis nenion.

Sed pro la antaŭa kriadado la tuta najbararo dume estis vekiginta. Hundoj bojis, infanoj kriis, intere oni aŭdis kelkajn virvoĉojn, alvenantajn pli kaj pli proksimen al la ĝardeno. Tiam la sinjorino an-

korau unufoje rigardis min, kvazaŭ ŝi volus min trapenetri per fajraj kugloj, poste returnis sin rapide al la ĉambro; ĉi-kune ŝi ekridis fiere kaj perforte kaj frapfermis la pordon antaŭ mia nazo. Sed la ĉambristino tute senceremonie prenis min je la basko kaj tiregis min al la ĝardenpordeto.

„Jen vi refoje faris nemalgrandajn malsaĝaĵojn“, ŝi diris al mi dumvoje, plena de malico.

Ankaŭ mi jam ekkoleris. „Nu, diable!“ mi diris, „ĉu ne vi mem estas vokinta min ĉi tien?“

„Guste tial“, kriis la ĉambristino. „Mia grafino havis tiom bonan intencon al vi, unue ĵetas al vi florojn el la fenestro, kantas ariojn — kaj jen nun la kontraŭpago por ŝi! Sed vi efektive neniel scias uzi bonŝancon; vi vere piedfrapas vian feliĉon!“ —

„Sed“, mi respondis, „laŭ mia opinio la grafino el Germanujo, la bela sinjorina moŝto — —“

„Ho“, ŝi interrompis min. „tiu jam delonge estas ja ree en Germanujo, kune kun via freneza amspirulino. Kaj tien nepre rekuru ankaŭ vi! Ŝi ja ege soifas ĉiam al vi! Tie vi povos kune ludi la violonon kaj rigardi la lunon — sed neniam plu vi venu antaŭ miajn okulojn!“

Sed nun terurega tumulto kaj bruado ekestis malantaŭ ni. El la alia ĝardeno homoj kun bastonegoj rapide grimpis trans la barilon; aliaj blasfemis kaj jam serĉis en la irejoj; perpleksaj vizaĝoj kun dormĉapoj rigardis en la lunlumo nun tie, nun tie trans la hekojn; estis kvazaŭ la diablo subite el ĉiuj hekoj kaj arbitaĵoj naskis gefiulojn.

La ĉambristino ne longe hezitis. „Tie, tie kuras la ŝtelisto!“ ŝi kriis al la homoj, montrante al la alia flanko de l' ĝardeno. Poste ŝi elŝovis min rapide kaj klakfermis la pordeton malantaŭ mi.

„Jen vi refoje faris nemalgrandajn malsaĝaĵojn“, silenta placo, tute sola, kiel hieraŭ mi estis alveninta. La fontano, kiu antaŭe tiel gaje trembrilis en la lunlumo, kvazaŭ anĝeletoj supren- kaj malsuprenirus en ĝi, daŭrigis muĝi ankoraŭ kiel tiam; sed mia ĝojo kaj mia gajeco estis dume falintaj en la puton.

Mi nun nepre decidis, por eterne turni mian dorson al la malsincera Italujo kun ĝiaj frenezaj pentristoj, oranĝoj kaj ĉambristinoj, kaj en la sama horo ankoraŭ mi elmigris tra la pordego.

Wege - Vojoj

Fast für jede Sache lassen sich zwei, drei Wege einschlagen; — viele Wege führen nach Rom. Welcher Weg der richtige, welcher der fehlerhafte ist, entscheidet die Zukunft, vielleicht wenn wir alle nicht mehr leben.

Otto v. Bismarck.

Preskaŭ por ĉiu afero estas ireblaj du-tri vojoj; — multaj vojoj kondukas Romon. Kiu vojo estas la ĝusta, kiu la erara? Pri tio decidis la estonteco eble tiam, kiam ni jam ne vivos.

*

Ein jeder muß die Wege gehn, die ihm in seinen Neigungen und Leidenschaften sind vorgezeichnet.

Phil. Eduard Devrient.

Ĉiu devas iri tiujn vojojn, kiuj estas antaŭsignitaj al li de liaj inklinoj kaj pasioj.

*

Wer uns vor nutzlosen Wegen warnt, leistet uns einen ebenso guten Dienst wie derjenige, der uns den rechten Weg anzeigt. Heinrich Heine.

Kiu nin avertas pri senutilaj vojoj, tiu faras al ni same bonan servon kiel tiu, kiu al ni indikas la ĝustan vojon.

Naŭa ĉapitro

Kaj iam en matena hor' la montojn trovas mi konatoj, kaj bonvenigas min la stratoj, kie mi iam migris for, Mi estas hejme! Dank' al Dio! Kun esperĝoja emocio salutas vin mi, revenant': Vivu la aŭstra land'!

Nun ankaŭ konas min la rond' de l' birdoj, riveretoj, arboj kaj ĉiu de l' Danubo ond'. La kampoj sonas kiel harpoj; kaj jen, kun ombra la mieno, ĉu ne jam estas de Vieno la katedrala turgigant'? Vivu la aŭstra land'!

Mi staris sur alta monto, el kie oni povas la unuan fojon rigardi en Aŭstrujon; kaj plezurplene mi estis ankoraŭ svinganta mian ĉapelon kaj kantanta la lastan strofon, kiam subite malantaŭ mi en la arbaro akompanante eksonis belega muziko de blovinstrumentoj.

(Daŭrigota.)

REJNAJ LEGENDOJ


Sendube, okaze de la Jubilea Kongreso de SAT en Duseldorfo, sed ankaŭ okaze de aliaj vojaĝoj en la Federacia Respubliko, multaj eksterlandaj gesamideanoj vizitot ankaŭ la belan Rejn-riveregon. Ili supozeble ŝatos ekscii tiun kaj tiun el ĝiaj legendoj. Jen du, kiujn prezentas al ni samideano Max Butin.

I. La „Mäuseurm“ apud Bingen

Meze de l' Rejno, proksime de la urbo Bingen, staras sur roka insuleto alta turo, la „Mäuseurm“ (museturo). Origine ĝia nomo estis Mauturm. Maut signifas doganon por varoj; sed la vorto arkaikiĝis kaj ekzistas nun nur en la familia nomo Mautner, t. e. doganoficisto. La popolo, miskomprenanta la esprimon Maut aŭ forgesinta ĝian signifon, transformis ĝin en Maus (muso). La Mäuseurm, konstruita en la 13-a jarcento, estis iam doganejo de la posedantoj, t. e. de la kavaliroj de l' kastelo Ehrenfels; hodiaŭ ĝi servas kiel signalejo al la preterveturantaj ŝipoj, ĉar ĉi-loke, en la t. n. Binger Loch (Bingena truo), la rivero estas mallarĝa kaj roketoplena. Ne malofte okazas, ke surfiginta ŝarĝoŝipo bare obstrukcas la trapasejon.

Kion rakontas la legendo pri la turo? — En la jaro 970 la loĝantoj en la Mainz'a regiono tre suferis pro malsatego, ĉar misrikolto estis vaniginta ĉiujn esperojn de la kampuloj. De kie preni la necesan sekalon por la ĉiutaga pano? Konsuminte la malabundajn provizojn, la nutroavidaj homoj manĝis hundojn, katojn, ratojn, maĉis nedigesteblajn raspitajn arboŝelojn, pistitajn kaj farunigitajn filikojn kaj vomigajn fetorantajn kadavraĵojn. En la kadukaj kabanjoj kuŝis stertorantaj agoniantoj, kiuj mortis sekve de malfortiĝo. Terpomojn Eŭropo ankoraŭ ne konis.

